
INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL



IMPRESSO

KOTIZTABELO UEA / 83 - GRAVEGA INFORMO

El afabla letero sendita de la Ĝen. Dir. de UEA, la 25an de Feb 83, ni transkribas la jenajn frazojn:

"Mi ege bedauras, ke tiel longe vi devis atendi respondon al via letero de 1982-1127 pri niaj financaj rilatoj. Ĝuste la jarfina periodo estis pli ol kutime peza en la financa sekcio.

Ni notis vian decidon postuli de la membroj, kiuj kotizas pere de vi, ekstrajn 25% pro la transpagaj kostoj. En viaj nunaj kondiĉoj, la decido estas tute komprenebla, kaj sendube ankaŭ la membroj rigardos ĝin tia. Intertempe ni venis al konkludo, ke nia principo fiksi la kotizojn por kiel eble plej multaj landoj en ties propra valuto kondukis al vere absurdaj rezultoj en tiuj landoj, kie la kurzo de la guldeno forte ŝanĝiĝas. Eĉ se ni plurfoje refiksas la kotizojn dum la jaro, la rezulto estas, ke por la membroj estas ĉiam pli avantaĝe prokrasti la pagon. Tial ni venis al la konkludo, por tiaj landoj ni revenu al la iama principo fiksi de ĉi tie la kotizojn en guldenoj kaj lasi al la kotizperantoj mem publikigi ekvivalentojn en sia valuto. Tiel ni ekzemple agas jam de kelkaj jaroj por Peruo. Ni do baldaŭ skribos al la koncernaj kotizperantoj oficiale pri tiu ŝanĝo. (s) Victor Sadler, ĝen. dir. "

ALIĜO AL UNIVERSALA KONGRESO

Ni atentigas vin pri la jena teksto elprenita el la ALIĜILO BUDAPESTO:

"Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigardataj kiel
jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en la kongresejo, pa
gante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo ".

Pasintjare, BEL miskomprene akceptis la aliĝilojn senditajn de kelkaj samideanoj, kiuj intencis partopreni la 67an U.K. Poste, ĝi ricevis el UEA la sekvantan informon:

"Kongresaj pagoj - En la lastaj jaroj ni ne plu akceptis la peradon de BEL por la UK, pro la suldoj de BEL a UEA. Nur pro ŝanĝo de oficisto ĉe ni (kiu ne sciis pri tio) estis akceptitaj viaj spezfolioj por la UK en Antverpeno.

Certe la UK ne povas akcepti la ŝarĝon de tiuj 58% da impostoj por brazilaj kongresanoj.

Se vi ne povos iel transpagi al la UK, ni kompreneble devos reveni al la principo ne akcepti kongresan peradon de BEL ".

Konklude, ni sciigas vin, ke niaflanke daŭras la transpagaj problemoj por kongresoj, ĉar la impostoj por tiaj transpagoj estas multe pli altaj ol tiaj rilataj al aĉetado de libroj, abono de revuoj aŭ aniĝo al eksterlandaj asocioj.

Do, almenaŭ nuntempe, BEL ne povas akcepti tiun kongresan peradon.

" HEROLDO " KAJ " EL POPOLA ĈINIO " - ABONKOTIZOJ EN NIA LANDA VALUTO

Certe vi jam rimarkis, ke la eldonantoj de HEROLDO kaj EL POPOLA ĈINIO fiksas la koti zojn de siaj periodaĵoj en eksterlanda valuto. Pro la ĉiutaga malvalorigo de nia kru zejro kaj pro la malfacilajoj rilataj al transpago de la abonkotizoj, ekde la 28a de februaro ni ŝanĝis la tabelon, kiun ni dissendis kun allogaj informoj pri tiuj legindaj periodaĵoj.

Pere de BEL-informas, ni daure sciigos vin pri la ĝisdatigitaj koțizoj Jer la kotizoj por la kuranta periodo, kiu eble daŭros ĝis la 30a de aprilo 83. Ni skribis "eble", car ni ne scias, ĉu okazos aliaj neatenditaj kaj egaj malvalorigoj de nia jam malfor-

ta kruzejro.

HEROLDO: marpoŝte (Cr\$ 4.000,00) - aerpoŝte (Cr\$ 5.500,00) EL POPOLA ĈINIO: abono por 1983 Cr\$ 2.000.00 abono por 1983/84..... Cr\$ 3.500.00 abono por 1983/84/85..... Cr\$ 5.500,00

Estas menciinde, ke nuntempe, sen kromaj pagoj, oni sendas EPĈ aerpoŝte, al ĉiuj brazilaj abonantoj.

XVI BRAZILA SEMINARIO DE ESPERANTO - 21-24/JULIO / 83

Jen la ĝenerala programo de tiu gravega seminario, okazonta en la tradicia urbo OURO PRETO-MG., laŭ informoj disvastigitaj de la kunordigantoj:

PAROLADOJ - STUDOJ - PROPONOJ - DECIDOJ - TEATRAĴOJ - VIZITOJ AL LA FAMA GROTO MAQUI-NÉ - LIBRO/SERVO DE LA KOOPERATIVO, KIEL KUTIME FUNKCIAS DUM LA SEMINARIOJ - BEJO (PROGRAMO ANONCOTA).

Pliajn informojn oni petu rekte al Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Av.Treze de Maio 47 - sobreloja 208 - CEP 20.031 - Rio de Janeiro-RJ - Tel. (021)220-7486) au al Instituto Esperanto de Educação (Rua Guajajaras 410-Ed.Rotary-89 andar S/809 - CEP nº 30.000 - Belo Horizonte-MG - Tel. (031) 222-4413).

ESPERANTO EN RADIO KOPAKABANA - RJ.

Ekde la 3a de la kuranta monato Radio Kopakabana(RJ)disaudigas, ĉiujaude, kvinminutan programon sub la auspicio de BEL: 23.25/23.30 (Loka horaro)-680kc kaj 5.015kc.Zorgas pri la redaktado kaj prezentado de tiu nacilingva priesperanta informilo nia sperta samideano JOEL MANSO, 2a Sekretario de BEL. Nomo de la programo: " UMA PONTE SOBRE O MUNDO " (PONTO SUR LA MONDO). Radio Kopakabana situas je Rua dos Invalidos 182- Rio de Janeiro-RJ.

VOCABULARIO PORT/ESP - ESP/PORT, de Carlos Domingues - 3a eldono

Antaŭ ol okazi la ĉiam bonvena elĉerpiĝo de Esperanta libro, oni devas zorgi pri la sekvanta eldono. Sed, pro pluraj baroj, ne ĉiam eblas fari tion. Kun granda plezuro ni sciigas vin, ke la vortaro supre menciita, reeldonita en majo 82 (1000 ekz) eble elĉerpiĝos dum la proksima monato. Ĉi-foje, ni sukcesis anticipe prepari ĝian trian eldonon. Permesu, ke ni fieru, almenaŭ pro tio. La malbona novaĵo rilatas al la kosto de la libroj: po Cr\$ 1.300,00:

ENKLASAJ KURSOJ ĈE NI

BEL jus presigis kaj disdonis nacilingvan cirkuleron kun informoj pri la enklasaj kursoj funkciontaj en ĝia sidejo, ekde la 15a de la kuranta monato.

KUNVENO EN SOROKABA OKAZE DE LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

La 27an de februaro lasta, kun la ĉeesto de najbaraj Esperanto-grupoj , de la prezida nto de BKE, kaj de la prezidantino de SPEA, la Esperanto-Klubo de Sorokaba brile festis la semajnon de internacia amikeco. Reprezentis Brazilan Esperanto-Ligon ĝia eks prezidanto SYLLA CHAVES, kiu omaĝe ricevis belan arĝentan karton pro lia laboro 1982 en la disvastigo kaj instruado de Esperanto. En sia parolado, nia eks-prezidanto montris du novaĵojn aperintajn en 1983: lia afiŝo-disko-kurso "KIO ESTAS ESPERANTO ?" (lancita en februaro) kaj lia libro-disko "BESTETOJ, BESTEGOJ KAJ BESTAĈOJ", kies oficiala lanĉo okazos tre baldaŭ (kaj kiu jam estas aĉetebla en sonbenda formo).

ELEKTO DE KOMITATANO "A" POR LA VENONTA OFICPERIODO

Antaŭ la 15a de junio 83, BEL, kiel landa asocio, devas informi al UEA pri la nomo de la elektita persono por reprezenti ĝin, kiel komitatano "A". Nuntempe, nia nura komitatano "A" estas Prof. SYLLA CHAVES. La estraro de BEL, pere de ĉi tiu bultemo, proponas re elekti nian samideanon Sylla, por la nova oficperiodo. Manko de reago al nia propono, ni interpretos kiel apogon al na nomo de ni proponita. Do, demokrate, ni atendas vian opinion pri la afero.